

INTERNACIA
CSEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO

HAGO (Nederlando)
OOSTDUINLAAN 32
TEL. 16720

HAGO, 30-Aŭgusto-1930.

Al s-ro F. FAULHABER,

Amsterdam.

Estimata Samideano,

kiel vi scias, nuntempe mi laboradas por ekfunkciigi nian
Instituton kaj mi volas baldaŭ aperigi la unuan bultenon.

La bulteno entenos interalie ankaŭ la liston de la Konsilan-
toj de la Instituto. La Konsilantoj estas gravuloj el la diversaj
kampoj de la tutmonda esp-movado (inter ili: D-ro L.Zamenhof,
D-ro Privat, Prof.Cart, Prof.Collinson, Prof.Bovet k.a.). Ili
helpas la Instituton per siaj konsiladoj okaze de aranĝoj, pri kiuj
ili estas kompetentuloj kaj ili per sia ofico esprimas la kunla-
boron de nia Instituto kun la esp-a movado. Se la agado de nia
Instituto iam ne trovos ilian aprobon, ili montros sian malapro-
bon simple per abdiko je la konsilanteco.

Konante vian grandan intereson pri nia Instituto mi volas nun
a m i k e komuniki al vi, ke mi tre ŝatus, se inter niaj konsi-
lantoj estus ankaŭ persono reprezentanta la laboristan esp-movadon
kaj mi estus tre danka, se vi bonvolus doni al mi opinion pri tio,
kiu persono estus por tio plej taŭga. Vi certe bone konas la la-
boristan movadon kaj tial kun fido mi atendas vian respondon. Komp-
reneble devos esti persono, kiu havas intereson pri la agado de
nia Instituto. Se nuntempe ankoraŭ ne ekzistas tia, ni prokrastu
la tutan aferon ĝis tiu tempo, kiam ĉe la laboristaj organizaĵoj
montriĝas intereso pri la afero.

Mi estus tre danka, se vi bonvolus respondi kiel eble plej
baldaŭ, ĉar ni devas nun rapide labori.

Kun plezuro mi konstatas laŭ viaj leteroj senditaj al mi, ke
via sinteno estis ĉiam plene korekta kaj tre saĝa.

Akceptu tutkorajn salutojn kaj bondezirojn, ankaŭ por la esti-
mata Sinjorino

de estimplene via:

Andreo C.



INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO

DEN HAAG (NEDERLANDO), OOSTDUINLAAN 32

TELEFONO: 16720

POŝTĈEKKONTO: DEN HAAG 162626

HAGO, 11-Junio-1931.

DIREKCIO:

ANDREO CSEH

JULIA ISBRÜCKER

KONSILANTARO:

PROF. P. BOVET, GENÈVE

PROF. O. BUJWID, KRAKÓW

PROF. TH. CART, PARIS

PROF. W. E. COLLINSON,
LIVERPOOL

KONSULO K. VON FRENCKELL,
DRESDEN

REKTORO S. JANSSON,
STOCKHOLM

D-RO EDMOND PRIVAT,
GENÈVE

S-RO ED. STETTLER, BERN

D-RO FELIX ZAMENHOF,
WARSAWA

D-RO LEONO ZAMENHOF,
WARSAWA

Al s-ro

F. F a u l h a b e r

Marathonweg 15. II.

AMSTERDAM.

Tre Estimata Samideano,

mi konfirmas la ricevon de via letero de la 8-Junio. Kun bedaŭro mi konstatas, ke via letero de la 10-Okt-1930 perdiĝis, ĉar ni neniam ricevis ĝin. En tiu tempo mi estis ankoraŭ en Hago kaj mi vere atendadis de vi respondon kaj mi ne povis kompreni, kial ĝi ne venas. Ĉu vi bonvolus nun ripeti ĝian enhavon?

La enhavo de via letero estas tre interesa kaj mi volonte parolus kun vi pri la afero. Ĉu vi povus kaj volus viziti min en Hago en la proksima sabato aŭ dimanĉo, aŭ ĉu vi deziras, ke refoje mi vizitu vin, kiel mi faris tion en la pasinta jaro? Bonvolu sciigi min tuj, por ke mi povu tiel aranĝi mian tempon en la nomitaj du tagoj.

Ĉar via farita kurso, laŭ via letero, estis Ĉe-metoda, mi petas vin, bonvolu plenigi kaj resendi al ni la ĉi tie aldonitan RAPORTON.

Kun bedaŭro mi aŭdis de diversaj flankoj pri klaĉado okazanta pri mia persono kaj pri nia Instituto en rondoj al vi proksimaj. Ĉar mi firme fidas en via korekteco kaj nobleco, mi esperas, ke vi donos al mi okazon por interparoli pri tiuj aferoj.

Atendante vian afablan respondon mi salutas vin kaj vian estimatan Edzinon

samideane kaj kore:

Ald.: respondkoverto.

PS. Post 5 tagoj mi forlasos Nederlandon kaj mi revenos nur en la aŭtuno.

Kopio.

Atlan, 12. Junio 1931

Estimata Sinjoro Ĉe!

Bonvolu pardonu pri tio ĉi rapida respondo, ĉar mi ne havas tempon.

La perdita letero enhavis la sciigojn, ke mi venis trois por la okupo de konsilanto de nia Instituto kaj kelkajn demandojn pri la unua leciono, kiujn mi momente ne plu memoras.

Ĝi estas eble al mi liberigi min por eĉ unu vespero en la sekvontaj du monatoj. La S.A.T. kongreso kaj la internaj aferoj en nia federacio bezonas mian tutan atenton kaj tempon. Tamen mia kazo momente ne estas disponebla por paroli pri la kurso ĉar pli urgaj aferoj postulas solvon.

La liston kun demandoj mi sendos al la Sekr. de la grupo, por kiu mi donis la kurson, ĉar li havas la ciferojn.

Pri klarigado mi aŭdis nenion, nur el via artikolo en "Hol. Esper." Se la klarigado okazis en rondo al mi proksimaj, kiel vi diras, ĉar mi ne komprenas, kial vi ne petis enpresigon de via artikolo en "Lab. Esp.", ĉar H. E. venis en rondo al mi mal- aŭ reproksimaj. Defoje: kion specialan oni diras pri via persono kaj pri via instituto, mi ne scias; mi nur scias, ke se oni estas gvidanto de iu afero, oni ĉiam spertas ion similan pri sia persono kaj pri sia organizo. Tion mi spertis dum 8 jara prezidanteco de la fed. de lab. esp. kaj tion mia fed. spertis dum sia 20 jara elektado. Tio antaŭ mi ne markis, nek mia afero!

Sed tiajn aferojn ni ne povas preparoli kun mi persone,
se ili rilatas miajn pandojn. Tiam ni turnu vin al la
federacia estaro, Jane va Galenstraat 257 /^{III}. A'don W.

Al kin sama adreso ni devas vin turni por paroli pri
Institutaĵaj interesoĵ. Tiam mi persone ne povas prizorgi.

Tiam la fed. estaro komisio al mi siate pe interrilati
kun ni pri la instruado, mi sciigis tion al vi. Sed kia
la fed. denove transprenis la korespondadon deprezinte de mi
kian ŝarĝo, la sekretario tion sciigis al vi. Tamen vi
venia turnis vin al la sekretario, sed nur al mi kaj ti
ne plaĉis al mi. Se la Instituto volas kun ŝanco je sukceso
labori, ĝi devas agnoski la organizadojn. Ankau vi deziras,
ke mi agnosku mian institutaĵon.

Por korespondi (en pli oportuna tempo) pri la instruado
(metodo) ne, mi ĉia estas preta, ĉar tio baziĝas sur
individuoj apartoj. Sed jam nun mi povas diri, ke estas certe,
ke mi ne donos pluajn kursojn dum la proksima vintro.
Tiam ĉi fojon denove estinte elektita kiel prezidanto de la
ĉefestaro, mi trovis sufiĉe da alia laboro.

Pardonu, ke mi ne povas pli multe skribi. Sed mi
ne volis prokrasti, ĉar jam morgaŭ estas sabato.....

Akceptu la korajn salutojn de mia edzino kaj

F. F.

Al s-ro F. FAULHABER, Amsterdamo.

Hago, 12-X-1957.

Estimata samideano!

Ricevinte vian poŝtkarton de la 18-IX mi povas sciigi vin, ke jam plurfoje ni klopodis sendi La Praktikon al s-ro Krestanoff, sed sen sukceso. Niaj registritaj sendaĵoj al Bulgarujo revenis al ni kun la surgluita ~~akxi~~ etiketo "Rifuzita", la neregistritaj sendaĵoj "perdiĝis survoje". Nun ni forsendis al li en unu registrita paketo unu tutan jarkolekton kaj ni sendis al li klarigan skribaĵon. Ni esperu, ke li fine ricevos niajn sendaĵojn.

Pri la 2-a parto de la UEA-jarlibro ni skribis al s-ro Krestanoff, ke li petu ĝin rekte de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo.

Kun samideana kaj amika saluto,

Adamo, 5/5 '59

Estimata Sinjoro Cech,

De Sinjoro Mendez el Rufo, kiel
mi ricevis aldonitan "salvon"
de la "ata-ita-problemo", pri kiu
solvo "li petis mia opiniono".

Pi m.o. komencis erare, elirante
de la naciaj lingvoj antaŭtatan
de Esperanto.

Sia maniero de klarigado es-
tas malfacila kaj laesiga, kaj
tial mi respondis al li, ke, kvan-
tamen pri ilij punktoj mi kon-
sentas, mi pri alij tute ne sam-
opiniaj kiel li, ekz. pri "la reĝo
ne estas nestata".

Mi antaŭvidis la panceon de
mia respondo kaj, ĉar via kaj
mia metodo por instrui la t.n.
"kunmetitajn tempojn" estas
esence egalaj, mi petis lian kon-
senton, ke mi sendu lian stud-
aĵon al mi.

Via metodo por klarigi ĉi tiun
punkton — mi spertis tion en du

Ĉekursoj, kiujn mi gvidis en 1931 — estas la ĝusta kaj konformiga bazo al la nia, gramatika maniero, kiun mi sugas jam pli al ĉi jaroj: esti montrata la tempo de la ago, kaj la particeps la stadion de la ago. Afero tre simpla.

Vi certe memoras ankoraŭ la diskuton en la publika kunveno de la Akademio en 1954 en Haarlem, kie ni kaj mi mal-konsentis pri la opinio de Prof. Waringhien pri tiu temo. Ĝiaj opinioj de W. kaj M. perversas nian metodon.

Ni ĉiam bedaŭras, ke mi ne sukcesis sukcedi la Ĉe-metodon en niaj pondo; kvankam la skrupuloj mi provas kompreni: relative nur malmultaj samideanoj kapablas instauri ĝin, kaj nenigo de eksterlandanoj estas ordinare tre mal-akosta. Tio neniel rilatas la metodon mem, pri kio mi esperis en tiuj du kursoj la plej

bonan sukceson precipe en la
"plej timata" parto de nia grama-
tiko: la "kummetitaj tempoj";
kiujn oni tuj komprenas, sed
en la plej komplikaj kombi-
noj.

Tamen, laŭ mia opinio, estus
bone, se la kursandoj post ĉiu
leciono ricevu maldistingvan
klarigon pri la pritraktataj,
ĉar mi spertis, ke tion, kion
oni tuj bone komprenis, bal-
daŭ forvaporigas. Necesas pres-
ita formo por fiksi la lernitaĵojn.

Donvolu pardonu mian sincerec-
on, kiu ja celas nur la bonon,
kaj precipe pardonu al mi, ke mi
per la letero de Mendez kaŭ-
zas al mi ~~ke~~ kelkajn ŝajnajn
ĉorojn.

Mi estas scivola pri via opinio.
Kun afablaj salutoj

Via
faulkabr.